

Leterujo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 526, 1973.11.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nia leterujo estas plena. Alvenis la momento ĝin malfermi por respondi al la afablaj salutoj de niaj skribemaj geaŭdantoj.

A.- Ĉifoje ni ricevis poŝtkarton kaj leterojn el 20 landoj. Jen nova pruvo pri la universaleco de nia aŭdantaro. Skribis aŭskultantoj el Aŭstralio, Aŭstrio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kanado, Kubo, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono.

Cl.- Laŭ la alfabeto vico de la landoj kaj skribintoj ni nun komencas nian babiladon kun nia aŭdantaro, citante el la plej interesaj kaj originalaj leteroj.

A.- En Aŭstralio ni salutas sinjoron Cecil Lanyon en Parkdale, ŝtato Victoria.

Cl.- En Aŭstrio sinjoro Rudolf Bartosch en Gross Siegharts skribis, ke jam de 10 jaroj li estas konstanta aŭskultanto de niaj radio-prelegoj. Li bedaŭrinde suferas pro grava malsano, muskolatrofio. Kiam li skribas, li tion povas fari nur helpe de unu sola fingro. Li sciu, ke liaj tajpaĵoj estas al ni duoble karaj. Sinjoro Rudolf Bartosch esprimas amarajn sentojn rilate al la esperanto-movado, kiun li vidas stagnanta. Kaj li informiĝas pri nia opinio tiurilate.

A.- Jes, verŝajne rilate al la grupa kaj societa vivo esperanto ne multe progresis dum la lastaj jardekoj. E1 tio la impresoj pri stagnado, kiun ricevas iuj esperantistoj. Sed ni ne forgesu rigardi al aliaj faktoj. Tiam ni rimarkas, ke neniam la esperanto-movado tiom viglis kiel nun. Neniam la ritmo de la libro-eldonado tiom rapidis. Tio pruvas, ke ekzistas kreskanta nombro da legantoj. Ankaŭ la kvalito de la lingvo mem altiĝis, ĉar tiu legantaro ne plu akceptas ion ajn. La stilo en la revuoj perfektigis. La nombro de la renkontiĝoj, kongresoj, restadoj kaj vojaĝoj, kie Esperanto estas uzata, ege kreskis. Kaj la kvalito de iliaj programoj estas en progreso. Jen faktoj, kiuj atestas, ke Esperanto ne stagnas.

Cl.- En Brazilo ni salutas la esperanto-organizaĵon *Associação Paulista de Esperanto* en Sao Paulo, kies sekretario avertas nin, ke en Brazilo la aŭdado de niaj elsendoj estas bonega sur la sonbendkanalo 25 metroj. Ĉiam en Brazilo ni salutas junan esperantiston, sinjoron Valdemir Jose Gindri Perufo en Santiago. Li lertiĝas en la praktiko de Esperanto aŭskultante niajn elsendojn. Ĉar li ŝatas lertiĝi en la lingvo, ni sendas al li libreton siatempe eldonitan en Svislando : *Du Amosentaj Noveloj*.

A.- En Britio ni havas multajn geaŭdantojn. Ni salutas sinjoron Blunden en Londono, gesinjorojn John kaj Florence Brownlee en Upminster, sinjoron Harry Holmes en Londono, kiu aĉetis tre potenca kurtondan ricevilon kaj aŭdas nin, kiel se ni parolus en Londono mem. Li diras : « *Mia edzino kaj mi ĉiam ĝuas la programojn el Bern kaj gratulas al vi ĉiuj, ke vi trovas tiom da interesajoj.* »

Cl.- Sinjoro Steve Huyton kaj sinjoro Ken Hadler en Hastings esprimas vidpunkton pri la lingva kaoso en Eŭropa Komunuma Merkato. Li opinias, ke Esperanto estus la plej bona solvo al tiu kaoso. La samon ni opinias, kiel cetere ĉiuj esperantistoj. Sed tiom longe, kiam la

gvidantoj de Eŭropo ne estos farintaj la eksperimenton de Esperanto, ili ne povos imagi, kiom taŭga estas tiu lingvo por la internaciaj rilatoj.

A.- Ni salutas gesinjorojn Alice kaj Walter Peake en York, sinjoron E. R. Penny en Malvern, kiu petas konsilojn, per kiu maniero li povas plibonigi la elekto-povon de sia radio-ricevilo. Ni sendas al li fotokopion de klarigoj, kiujn siatempe aperigis la *Bulteno Pilo-Press*, kies aŭtoro estas tre aktiva radio-aŭskultanto de la kurtondaj esperanto-programoj. Ni aldonas broŝuron en la angla eldonita de la kurtonda servo de Svisa Radio : *Build-your-own-antenna*.

Cl.- Gesinjoroj E. Najbaro en Keighley, kiuj estas niaj plej skribemaj geaŭdantoj, fariĝis veraj konatoj. Iliaj eĥoj al niaj elsendoj, kiujn ni ricevas monaton post monato, estas vera speco de agrabla konversacio pri niaj prelegoj kaj tiuj de nia kolego doktoro Arthur Baur, kies voĉon ili atendas, ni citas : « *kiel sonorileton de la svisa montaro, kiun ni aŭskultas kun granda plezuro dum kelkaj minutoj ĉiusemajne.* » Kaj ili aldonas : « *Ni vere ĝojas, ke ĝi iĝas pli kaj pli konata voĉo al ni.* » Sinjoro B. Najbaro ŝatas la prelegojn de doktoro Baur, kiuj rakontas pri Svislando, kaj li sekvas sur mapo liajn klarigojn.

A.- Kiel multaj geaŭdantoj, sinjoro Najbaro ŝatis niajn intervjuojn de esperantistoj. Ni citas : « *Ni bone aŭdis la intervjuon, kiun sinjoro Gacond faris kun doktoro István Szerdahelyi. Aparte de la temo, pri kiu ni legis erojn ie jam kaj kiu ja estas ne nur interesa, sed ankaŭ tre ekscita por ĉiu, kiu interesiĝas pri la Internacia Lingvo, la aldono de « nova voĉo » en viaj disaŭdigoj estas bonvena. Precipe por la novaj uzantoj de nia lingvo, tio estas grava ekzerco en la lernada aŭskultado kaj komprenado de nia lingvo.* »

Cl.- Kaj sinjoro B. Najbaro rakontas tiurilate ion interesan. Ni citas : « *Pri tio mi konsciiĝis, kiam ni disaŭdigis kelkajn registraĵojn (tute bonkvalitajn) de viaj disaŭdigoj [...] al grupo de Keighley-anoj. Surprizis min, ke kelkaj jam tute spertaj anoj, kiuj uzas nian lingvon dum la kunvenoj, ne povis sekvi la parolojn de la disaŭdigoj. Ili estis tro rapidaj ! Dum mia edzino kaj mi jam bone alkiutimiĝis al la voĉoj de fakte ĉiuj parolantoj de ĉe ni aŭdeblaj disaŭdigoj en Esperanto, povas sekvi la temon eĉ se la aŭdebleco ne estas tiel bona. Tial mi opinias, ke enkonduko de « novaj voĉoj » en la programoj estas tre necesa parto en la plispertiĝo de via aŭskultantaro. Sinjoro Gacond per la enkonduko de intervjuoj trovis bonegan manieron, kiel tion fari.* »

A.- Multaj aŭdantoj bedaŭras la mallongecon de niaj elsendoj. Ankaŭ ni bedaŭras tiun fakton. Nur kiam la kurtonda servo de la Svisa Radio ricevos kreskantan nombron da poŝtkartoj kaj leteroj en Esperanto, pliboniĝos niaj paroladoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!